



ISSN 1886-1997

Kajeroj el la Sudo

La 29^a jaro



Bulteno de la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj

<http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k97.html>



Tra Hispanio

Pri la Kataluna Respubliko

Ĉu la problemo estas islamofobio?

ISSN 1886-1938 (printita)

ISSN 1886-1997

Depósito legal: Z-2398-88

N^o 97^a

oktobro 2017

Kajeroj**el la Sudo**

*Bulteno de la Hispana Asocio de
Laboristoj Esperantistaj (HALE).*

**Calle Jabonerías, 6.3º D
30010 Murcia
Hispanio**

ISSN 1886-1997 aŭ
1886-1938 (se printite)
Depósito legal: Z-2398-88

Prezidas: **Johano A. Cabezas.**
Redaktas: **Jesuo de las Heras.**
Korektas: **Jozefo Pina.**
Retskribu al: **kajeroj@gmail.com**

Enhavo

Redaktore: Libereco	3
Pri sendependenco de Katalunio	4
La sengaja vivo de Abdul Saleh'.....	5
Ĉu islamofobio estas la problemo?10	
Fantazia demokratio.....	12
La Faraono, ĉ. 46ª.....	14
Kio okazas en Hispanio?.....	20

**Oni povas reprodukti la enhavon,
kondiĉe, ke oni citu la originon.**

**Pri la enhavo de la artikoloj respondecas
ties aŭtoroj, ne la redakcio.**

**Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj,
kvankam ni klopodos publikigi ĉiun artikolon
kies enhavo mistraktu neniun personon.**

Kovrilo: Teroristoj mortigis dek ses senkulpajn promenantojn sur popola barselona promenejo. Verŝajne polico ne estis sufiĉe vigla malebligi amasmurdadon tiam, sed neniu ŝajnas respondi pri tio.

Nesubskribitajn
artikolojn verkis la
redaktoro.


Pagmaniero: aliĝu al HALE kontraŭ €10 jare por ricevi la surpaperan version de nia magazino.

Konto **ES30 2100 4617 4122 0011 5275.**

Notu vian nomon kaj la jaron, kiun vi pagas.

Poste, sendu noton al kajeroj@gmail.com

**Tute verkita kaj kompilita per senpagaj
linuksaj rimedoj: OpenOffice Writer,
Gimp, Scribus kaj Bluefish.**



Redaktore


Libereco

De kiam komencis mi aperigi nian magazinon kiel bultenon de HALE, estas ĝenerala sopiro al libereco en ties paĝoj.

Tio ja ne estis senkoste. Aŭdi kaj eĉ aŭskulti ĉiujn vekas malamon de ĝisostaj, netolere-maj partianoj. Niaj paĝoj eĉ subtenis ideojn de diversaj tendencoj, ĉar ni kredas, ke plej bone estas koni tion, kion malamikoj pensas. Sed, tamen, preferinde estas ne havi malamikojn, ĉar ni vere havas neniun veron absolutan oferti al la mondo, male al partianoj de politikaj kaj religiaj dogmoj.

HALE naskiĝis kiel LEA-o de SAT, pro tio antaŭ kelkaj jaroj mi volontulis kiel reprezentanton de nia asocio en la Plenum-Komitato de SAT. Oni povas pensi, ke tiu estas organizo, kiu efektigas tion, kion la Ĝenerala Asembleo de la Sennacieca Asocio Tutmonda decidu, sed la eventoj, kiuj okazis tiam pravas, ke tio povas esti male. Unue oni plendis, ke mi ne estas ano de SAT, kaj pro tio mi ne povas esti delegito de LEA-o en oficiala organo de la asocio. Rigardante

la tiaman Statuton, konstatiĝas, ke oni ne bezonas nepre esti ano de SAT por reprezenti LEA-on en Plenumkomitato, kvankam veras, ke la kazo neniam okazis antaŭe.

**APERIS LIBRETO DE PASPORTA SERVO**

Post plurjara paŭzo denove estas aĉetebla la adreslibro de Pasporta Servo en papera formo!

La 15-centimetra kaj 248-paĝa libreto enhavas adresojn kaj datumojn de 974 gastigantoj en 81 landoj.

La libro estas aĉetebla ĉe la libroservo de UEA kontraŭ 9 eŭroj (+ sk) laŭ la reta katalogo <http://katalogo.uea.org?inf=3474>

Retejo de la senpaga gastiga servo Pasporta Servo estas <http://www.pasportaservo.org>



Poste la Plenum-Komitato akceptis la proponon de Prezidanto Jakvo Ŝram' pri tio, ke la delegitoj de LEA-oj nepre estu anoj de SAT. Tio estis maljuste, kompreneble, kaj ankaŭ maljure rilate al mia aneco al la PK, ĉar mia propono estis antaŭa al tiu decido. Sed ne estis katastrofo por mi tiam konstati denove, ke leĝo tordiĝas verŝajne laŭ kaprico de homo en povo. Neigante mian antaŭan decidon ne reveni en SAT-n post mia volonta ekŝigo en Nagikanŝa pri malkonsento kun la Prezidanto de la Plenumkomitato..., tiel, kiel mi jam rakontis en numero 63^a (*La problemo pri SAT*). Mi kredis, ke post mia reveno, la afero jam estis finita. Sed malamo estas leĝotordanta, kaj finfine la tiam Prezidanto ekŝigis SAT-n li mem, postulante, ke li revenos nur se oni forpuŝas min el la asocio. Verŝajne tiamaj plenumkomitatanoj konsideris, ke la Moŝta Prezidanto Ŝram estas pli valora al la asocio ol simpla delegito de LEA-o, kiun ĝis tiam SAT ne multe atento donacis, kaj sekve mi ricevis leteron informante, ke la Plenumkomitato decidis ekŝigi min de la asocio, kaj neniam prenos min denove en sia sino. Ne malbone, ĉu?, por asocio tutmonda, kiu estas kontraŭ perforto kaj maljusteco... Eble oni plendas mondskale kontraŭ Donald' Trump' pro tio, ke li misuzas sian povon..., sed mi suferis misuzon de povo kaj fobion de prezidanto supozebla defendanto de paco kaj libereco en

sino de Plenumkomitato de asocio supozeble defendanta pri samaj aferoj. Mi kredas ke tiun tagon, la tagon, kiam sia PK perfortis sian propran statuton, SAT ĉesis signifi ion. Kaj mi domaĝas pri tio. Mi ne domaĝas pro tio, ke mi ne estas tie, kie oni ne volas min, sed mi domaĝas pro tio, ke bonkoraj samideanoj, kiuj deziras ŝanĝi la mondon permesis, ke la mondo ŝanĝas ilin, tiel ke ili perdis siajn esencon kaj tiun de la asocio, kiun ili diris, ke ili defendas. Tiu aventuro ne temis pri mi kaj Ŝram', sed pri Ŝram' kaj SAT, kaj ĵuro.

Multaj jaroj jam venis kaj pasis, kaj mia sinteno al SAT daŭre estas sama: ili havas nur bonajn sopirojn por ke la mondo estu pli bona kaj justa, sed ili ne komprenis, ke tio komencas iĝante pli bonaj kaj justaj ili mem. Kaj komenco povas esti plenumkomitata letero invitante min aliĝi la asocion. Mi dubas, ke mi revenos, sed tio estus kuracilo por SAT mem. Mi nek scias nek malprifajfas, ke la anoj de la Plenumkomitato de SAT estas aliaj (fakte kelkaj jam mortis, kaj Ŝram' mem ne plu estas prezidanto, laŭ mia informo), sed SAT devas malstagni kaj lerni respekti sian propran statuton, kaj fidi sin mem. Leganto povas kontroli la tiaman **Statuton de SAT** sur niaj paĝoj de la numero 50^a ĝis 58^a. **Jen elegio mia pri spirito de Lanti kaj kunantoj, kiuj fondis la Sennacian Asocion Tutmondan!**

Pri la sendependenco de Katalunio

De kelkaj monatoj publika opinio en Hispanio kaj plejparto de aliaj landoj estas kaptitaj de la *pruses'*, tio estas, la procedo de katalunaj sendependistoj apartigi tiun regionon hispanan, Katalunio, el la cetera parto de nia nacio.

Pardonpetas mi, ke mi ne venis plu frue antaŭ vi. Vere estas, ke niaj kutimaj kunlaborantoj ne venis helpi min ĉi-foje, sed tamen laŭ la jaro 2017^a mi trifoje estis publikigonta la nunan numeron de nia revuo. Sed eĉ se dume okazis gravaj eventoj en nia lando, mi ĉi-foje rifuzas ŝanĝi denove la koverton kaj la ĉefartikolon, ĉar tio estus gravigi ion, kio ĉiam estis *ĉifona politiko* en kelkaj partoj de Hispanio, kie malsolidarecon oni volas vesti per pli honorindaj rompitaĵoj, nome naciismo, sendependismo, honoro, kaj tiel plu.

Laŭ mia eltrovo, ŝajnas ke la katalunaj politikistoj provis sendependiĝi unue, por ke la registaro de Hispanio helpos ilin *trovisian lokon en la internacia koncerto de nacioj*, ĉar ili ne havis armeon aŭ monon, kiel ĉiuj kompetentaj puĉistoj havis laŭ la tuta historio de homaro. La tuta afero ŝajnas al mi infana ludo, eĉ se ĝi havas nun neatenditajn sekvojn de puĉistoj. Pro tio ili nun estas en karcero aŭ ekzilo. Sed same kiel nerespondecaj geinfanoj, ili nun plen-

das, ke *ili faris nenion*, kaj ke oni *reprezalias ilin ĉar ne estas demokratio en Hispanio*.

Nu, mi diras, ke ili pravas, sed ne pro tio, kion ili diras: nun **estas demokratio nek en Hispanio nek en Katalunio**. Ambaŭlande politikistoj ne reprezentas la popolon, sed la partiojn politikajn, kiuj ne atentigas al bonfarto de civitanoj, sed al tiu de si mem. Alimaniere la eksregistaro de Katalunio neniam deklarus sendependiĝon kun tiom malmulte da voĉdonoj kompare al la tuta nombro de civitanoj de Katalunio. Kaj se la voĉoj estus vere plimultaj, la procedo devus esti laŭleĝe, ne tiom infaneske.

La Registaro Hispana ne estas pli demokratia, ankaŭ: Ili plendas, ke demokratio baziĝas sur respekto al leĝoj, sed tamen artikolo 155^a ne ebligas Prezidenton hispanan eksigi registaron katalunan, sed nur promocii, ke ili plenumu leĝon per iu ajn manieron. Sed eksigo vere estas maniero malebligi tion. Laŭ mi, tiu maniero malplenumi leĝon fare de la Hispana Registaro estis ruzo ne uzi artikolon 116-an, kiu lasus kontrolon en manoj de armeo. Kompatinda lando, kies politikistoj ne estas kuraĝaj!

Pro tio mi prifajfas tiun ĉi *revolucion surpaperan*.

La peko de l' taliban' *La sengaja vivo de Abdul Saleh'*

2 La homo de l' dezerto.

Tri tagojn poste Abdul' Saleh' promenis ekster vilaĝo kiam li trovis maljunulon.

«Dio estu kun vi, junulo».
 «Kaj kun vi, nobla maljunulo».
 «Ŝajnas, ke io turmentas vin».
 «Vi estas eksterlandano, certe, maljunulo. Se ne, vi scius, ke ĵuse junulinon oni ekzekutis pro malpureco».
 «Vi pravas, knabo. Mi vivas en dezerto, kaj mi scias nenion pri ekzekuton».

Abdul' Saleh' rigardis la ŝtonojn de l' vojo kun malgaja mieno.

«Ĉu ŝi estis via konatulino?»
 «Jes. Rejin' aĝis same kiel mi, kaj mi konis ŝin de multe da jaroj».
 «Kaj kion tiu junulino faris meriti morton?»
 «La plej malnobla el ĉiu ago, respektibla maljunulo: malpureco».
 «Ĉu ŝi estis putino?»
 «Ne, sed ŝi ne sufiĉe firme oponis al viroj, kiuj volis seksumi kun ŝi».
 «Kion povus fari knabinon kontraŭ kelkaj viroj, se ĉiu el ili estis pli forta ol ŝi?»
 «Virino meritanta venigi en mondon bonajn gefilojn de Dio devas oponi sin al perforto pere

de sia propra vivo, se necese, ĉar sufiĉas nur unu momento de akcepto por ke perforto iĝas konsentata ago, kaj sekve ŝi ne plu estas viktimo, sed kulpulino».

«Tre dura vi estas kun via najbarino, pia junulo. Kiel vi



nomiĝas?»
 «Abdul' Saleh'».
 «Abdul' Saleh'», ripetis la homo. «Dio ne volas, ke siaj filoj mortigu siajn filinojn. Dio volas, ke siaj filoj amu siajn filinojn».
 «Tio estas blasfemo, maljunulo! Kiel nomiĝas vi?»
 «Oni konas min kiel Pro El Fu».

«Proelfu', ĉu vi ne scias, ke nia leĝo superas niajn personajn dezirojn? Nenio povas antaŭ la volo de Dio!»

Pro rigardis tiun projekton de homo kun kompato sur lia vizaĝo. Post momento de silento, li riproĉis:

«Abdul' Saleh', ĉu vi diras, ke Dio volas la vivon de juna virino?»

«Jen estas leĝo».

«Dio estas kompatema, Dio amas siajn gefilojn, Dio ne volas ke ili murdas unu la aliajn».

«Blasfemo, oldaĉulo! Kiu vi kredas, ke vi estas por interpreti la dezirojn de Dio?»

«Rigardu al mi, aroganta junulo kverelema: mi civitanas la Sanktan Urbon Ibn Alsaah, kaj oni konas min kiel Pro El Fu ĉar mi estas La Profeto El Futuro, kiu venis puni vin pro via senkompato kaj dureco de via koro. Se vi plenumas vian punon vi povos iri en Paradizon kun Rejin'».

Kaj preninte manpleno da sablo de la grundo, li kraĉis sur ĝin kaj kun apartigitaj brakoj li rigardis la ĉielon kaj kriis:

«Je la nomo de Dio, la Justa, la Pia, La plej Alta, la Bona, mi kondamnas vin, Abdul' Saleh', trairi ĉion, kion vi per via malmulta respekto kaj sento kondamnis tiom maljuste! Estu la Volo de Dio nun kaj dum ĉiam, jarcenton kaj jarcenton, Amen'!»

Kaj li ĵetis la manpleno da sablo sur la junulon.

Kaj kompatinda Abdul' Saleh' vidis, ke la suno malaperis el ĉielo. Ĉio iĝis nigra kaj li sentis fortan ekdeziron dormi, dormi, dormi...

Dua parto: Zorajd'.

3 Amara vekigo.

«Supren, Zorajd'! Vi malfruas purigi la domon».

Abdul' Saleh' malfermis siajn okulojn kaj vidis la koleran rigardon de sia patrino. Al kiu krias ŝi per tiu kolera maniero?

Zorajd', ripetis li. *Kiu estas tiu Zorajd'?* Ĉu siaj gepatroj finfine luis servistinojn?

Sed vangofrapo vekigis lin finfine.

«Vestiĝu, knabino maldiligenta! Vi ankoraŭ devas fari multe por gajni tion, kion vi manĝos hodiaŭ».

«Mi...»

«Supren!», ordonis patrino kun alia vangofrapo. «Sed kio okazas al vi hodiaŭ?»

Per akra movo ŝi forprenis la tualon sub kiu ŝi dormis, kaj ĵetis sur ŝin vestaĵon, kiu estis vere sako kun tri truoj grandaj kaj kapingo.

Terurigita, Abdul' Saleh' tuŝis sian bruston kaj tie li trovis du protuberancojn sentemajn al sia

tuŝo. Li rigardis al sia interkruro kaj konstatis, ke tie mankas io. La tri aferoj, kiuj difinas sian virecon. Anstataŭ, estas fendaĵo, kiun li volis havi sian tutan vivon, sed ne per tiu ĉi maniero, sed el ekstere. Patrino rapidigis el apuda ĉambro:

«ĴZorajd'! Vi venu nun! Ĉu mi devas venigi vin per bastono?»

Li ankoraŭ memoris la du fortajn vangofrapojn, kiujn ŝia patrino ĵus donis al ŝi antaŭ kelkaj minutoj. Rapide ŝi metis sian kapon tra la plej granda truo el sia vestaĵo kaj elirigis manojn tra la du aliaj. Poste ŝi metis sian kapon en la kapingon pendantan, kiu alĝustigis perfekte al ŝia kapo. Farante tion ŝi konstatis, ke sia hararo estas nigra kaj longa, kaj ŝi metis ĝin tiel bone, kiel ŝi povis ene de la ingo, kaj eliris sian ĉambron.

«Panjo, mi...»

«Silentu. Prenu balailon kaj balau. Ni havas malmulte da tempo antaŭ via patro venos, kaj vi jam konas lin...»

Ŝi silentis ne tiom multe pro la voĉo de sia patrino, kiom pro tiu sia propra, multe pli akuta ol ŝi memoris. Abdul' Saleh' ne plu estis Abdul' Saleh'. Ŝi konstatis, ke li nun estas Zorajd'. Ŝi prenis balailon per ambaŭ manoj kaj ekbalais dum larmoj faladas laŭ siaj vangoj».

«Nun kio okazas al vi, Zorajd'? Kial tiuj larmoj? Mi ne batis vin

tiom forte».

«Panjo..., mi ne scias. Kial mi ne estas viro?»

«Ho mia filino! Tiel Dio volis. Kiam niaj patrinoj naskas nin, neniu demandas al ni ĉu ni volas esti viro, ĉu virino. Dio, per sia nelimigita saĝeco tiel decidis».

Zorajd' silentis kaj balais per pli granda forto kaj la tutan domon en kelkaj minutoj. Poste ŝi prenis kuvon plena da akvo kaj frotilon kaj purigis la plankon de la tuta domo en malpli ol duonhoro.

Patrino rigardis ŝin mirigite, sed iris al siaj taskoj.

«Lasu min, panjo!», aŭdis Zulem' dum Zorajd' forprenis la ventumilon el ŝiaj manoj kaj aerumis energie la fajron kie karbo brilanta varmigis la manĝaĵon.

Per multe da impeto ŝi faris domajn taskojn, kaj poste petis permeson al sia patrino por lavi sin. Zulem' rigardis sian filinon surprizite:

«Filino, ĉu vi fartas bone? Kio okazas al vi?»

«Panjo, mi sentas min malpura. Mi volas puriĝi».

«Kompreneble, filino, vi ne devas peti permeson por tio. Faru tion. Sed mi ne komprenas, ke vi estis tiom maldiligenta dekomence, kaj nun vi purigis la tutan domon kvazaŭ vi estas kirlo....»

Zorajd' trovis puran vestaĵon en sia ĉambro kaj poste fermigis sin en duŝejon. Ŝi nudiĝis tre malrapide, kaj poste ŝi rigardadis sin per spegulo: ŝia haŭto estis pli klara ol kiam ŝi estis viro. Ŝiaj mamoj estas grandaj kaj duraj, kvankam ŝi estas pli malalta kaj larĝa ol li, sed ne dika. Ŝi karesis siajn koksojn, krurojn, mamojn, koncentriĝante pri tio, kion ŝi sentas, sian tuŝon, same de siaj manoj kaj de tio, kion ili tuŝas. Ŝi konstatis, ke sia sekso reagis tiom rapide kaj intense, kaj ŝi ekhavis kvazaŭ nevolante la unuan orgasmon en sia vivo. Ŝi eniris la duŝon kaj prenis pluvon da malvarma akvo dum dek minutoj. Neniam en lia tuta vivo li spertis malvarman duŝon, sed ŝi konstatis, ke en tiu ĉi momento tio estas tio, kion ŝi bezonas.

Ŝi ne estas aparte bela. Ne, ŝi ne estas unu el tiuj virinoj, kiujn li rigardadis surstrate. Ŝi estas agrabla kaj trovis en si sufiĉe da ĉarmo, tamen, pekigi viron, same kiel Rejin' faris. Kompatindulino. Nun ŝi estas Rejin'. Ĉu ŝi finos same kiel ŝi?

Zorajd', male, scias ĉion, kion **La Libro** diras pri virinoj. Ŝi scias, ke ŝi havas sufiĉe da *armiloj* por ke unu viro iĝos ŝian sklavon, sed tiuj samaj armiloj povus irigi ŝin al morto, se kelkaj viroj trovas ŝin uzante ilin.

La tutan matenon Zorajd' pensis pri **La Libro**, kaj ŝi decidis kaŝi sin.

Kiam Ibrahim', ŝia patro, venis

el laboro, li trovis siajn babuŝojn apud lia preferata seĝo, kaj proksime de ĝi sian filinon kun ejo plena da varma akvo.

«Sidiĝu, patro. Bonvenigita en vian hejmon».

Se surprizita estis la edzino, ŝokata estis la kompatinda viro. Ĉu tiu estis sia filino? Kio okazis? Kie estas plendoj ŝiaj? Kial ŝi ne plu estas ĉe sia ĉambro, kaŝita de li kiel kutime? Kion ŝi faris por kompensi sian kulpon?

La bona homo sidiĝis kaj vidis kun plezuro, ke lia filino senŝuigis lin kaj poste lavis liajn piedojn per varmeta akvo. Poste ŝi tre efike sekigis ilin, kaj laste metis babuŝojn sur ili.

«Jen, paĉjo. Kun via permeso, mi forprenos la akvon, sed mi revenos tuj».

«Ĉi tie mi atendas vin, filino», la viro sukcesis diri.

Kiam ŝi revenis, la geedzoj ne povis kompreni strangan dialogon:

Unue Zorajd' kisis sian patron survange. Poste ŝi diris:

«Paĉjo, mi volas peti ion de vi».

«Ho! Ne plu mi miras pri via ĝentileco, filino. Petu».

«Patro, mi volas peti permeson de vi por legi **La Sanktan Libron**».

«Virinoj ne legas **La Libron**, filino. Vi scias tion».

«Jes, patro. Sed mi bezonas ĝin».

«Kial vi bezonas ĝin subite?»

«Paĉjo, mi ne volas fi **Daŭrigota**

Ĉu islamofobio estas la problemo?

La pasintan monaton aŭguston dek ses hispanoj kaj turistoj estis mortigitaj de, supozeble, kvin islamanoj pere de kamioneto. Policianoj rilatigis tion al eksplodo kaj detruo de konstruaĵo en Alkanar', provinco de Tarragono, kelkajn tagojn pli frue.

La teroristoj facile forlasis la kamioneton kaj eliris la urbon, sed tio, ke oni ĝenis ilin. Ili rabis pasantan aŭton kaj

mortigis ties ŝoforon, kaj iris en alian urbon, Kambrils', kie ili provis fari same. Bedaŭrinde por ili kontrastaŭris ilin ĉu policistino juna, ĉu legionano (oni ankoraŭ ne scias kiu, pro la turpa prezentado partiana de novaĵoj ĉe niaj amaskomunikiloj), sed fakto estas, ke ili estis mortigataj per pafoj de polico.

La afero okazis ene de sensenca procezo de katalunaj registaristoj cele al sendependiĝo de Hispanio. Ili nomas tion *malkonektigo*, kvankam tio signifus, ke ili antaŭe estis konektitaj al cetera Hispanio, kion mi vere dubas. Tio igis kataluna

polico ne permesi kunlaboron de ŝtata polico, kiuj vere rilatigis detruon de domo en urbo Alkanar' kun teroristoj de Barse-lono. En tiu domo ili pretigis bombojn pere de gazaj botelegoj, sed io fuŝis kaj ili mortis, kaj la konstruaĵo detruigis



ĝisfundamente. Mi scivolas pri tio, kiu pagos al veraj posedantoj de la domo, ĉar ili estis tie kontraŭleĝe. Jes, ili estis *okupas*, tio estas, ili simple rompis la pordon kaj eniris la domon, kaj pro idiota leĝo hispana hodiaŭa, la posedantoj ne povas forpuŝi ilin, sed komenci procedon ĵuran, kiu povas daŭrigi jarojn, sed antaŭ tio konkludos, la krimuloj povas jam detruji la domon, kiel oni vidis en tiu ĉi kazo. Mia estas la konvinko, ke politikistoj, kiuj faris tiun leĝon ne pagos al posedantoj de la domo por nova konstruado.

Ĉiel ajn, la Civila Gvardio, kiu jam rilatigis ambaŭ aferojn, es-

tis tute ne atendata de la kataluna polico, kaj sekve teroristoj senĝene povis mortigi preskaŭ du dekojn da senkulpaj promenantoj, ĝis kiam alia policano haltis ilin pere de kugloj en alia urbo.

La afero per si mem jam estas sufiĉe grava kaj bedaŭrinda. Sed estas alia problemo aldonita, kiu estas vera insulto al memoro de murditoj: nun ŝajnas, ke la vera problemo en Hispanio ne estas amasmurdado, sed tio, ke homoj malamas islamanojn! Mi vidas, ke en retejo oni denoncas kaj kondamnas, ke homoj diras, ke ili malŝatas la islaman religion, kaj ties adorantojn. Kaj la vero estas, ke kelkaj ricevas monpunojn kaj minacojn esti enkarceriataj pro tio. Aliflanke, mi vidas en televido ke en manifestacioj estas kelkaj homoj vestitaj kiel islamanoj, kiuj protestas kontraŭ la amasmurdo. El tio oni povas eltiri, ke ne ĉiu islamano kulpas pro tio, vere. Sed tio ne pruvas ke murdistoj ne estas bonaj islamanoj. Fakte, se oni konsultas la Sanktan Libron de islamanoj, oni ne vidas kondamnan vorton kontraŭ homoj, kiuj mortigas pro sia religio, la sola vera, laŭ ili.

Mi vidas, ke en amaskomunikiloj ne nur estas primokoj pri kristana kaj juda religioj, kaj neniu plendas, sed se oni publikigas bildon aŭ opinion malfavoran kontraŭ la religio de Mahometo, oni plendas pri islamofobio kaj minacas kun laŭleĝa persekutado. Kaj tion mi trovas troiga. *Ĉu ĉiuj maŭraj ĉu ĉiuj kristanaj!*, diras la proverbo hispana, celante

diri, ke oni devas trakti ĉiujn same. Tio estas deca kaj demokratia. Sed politikekorektistoj kreis arogantan cenzuron, kiu protektas islaman religion kontraŭ aliaj. Do, oni povas kritiki la papon, sed ne islamanojn. Pro tio mi forlasis ATEO-n, Ateisman Tutmondan Esperantan Organizon, kiam okaze de murdo de Osama Bin Laden fare de usonaj soldatoj, mi metis foton de tiu ulo kune kun titolon de ena artikolo ***Kaj finfine Osama venkis Obaman!*** En la redaktora artikolo mi abundis pri la temo, kaj la Prezidanto tiutempa kaj aliaj estraranoj opiniis, ke oni ne povas publikigi tion. Do ŝajnis, ke oni povas kritiki kristanan religion (tiu, kiu formigis Eŭropon, kaj tiurilate oni povas nomi ĝin kiel nian, eĉ se ni estas ateistoj), sed ne la islaman religion. Oni ankoraŭ ne parolis, je 2010, pri islamofobio en Eŭropo, sed jam estis la sento, ke oni ne veke la leonon... Mia inklino estas, vere, ke oni dresu la leonon, ĉar ni ne bezonas la leonan vivmanieron, sed se leonoj deziras vivi inter ni, ili devas lerni nian vivmanieron aŭ reiri hejmen. Pro tio mi forlasis la redaktadon de ties magazino kaj la asocion mem.

Mi daŭre opinias, ke liberpensado estas pli grava ol ne tikli islamanojn, aŭ anojn de iu ajn aliaj religioj, klubteamoj aŭ politikaj partioj. Laŭ mi ili estas same senpravuloj.

Fantazia Demokratio

De kelkaj tagoj mi suferas la aperon en Televidoj kaj aliaj amasmedioj, de propagando pri la **Kvardeka Datreveno de la Realveno de Demokratio en Hispanio!**

Mi esprimas ion, kion mi ne taksas vere opinion, sed konstatacion pri tio, ke ne eblas kontentiĝi pri datreveno de demokratio, ĉar demokratio neniam ekzistis en Hispanio, ankoraŭ ne ekzistas nun, kaj verŝajne neniam ekzistos en nia lando. Eble oni miros al tio, ke mi, kiu ade fieras pri mia sennaciismo, parolas nun pri **nia lando**. Mi konfesu unue, ke temas pri la lando, sur kiu mi vivis la plej granda parto de mia vivo, kaj tio ne igas ĝin posedaĵo mia, kaj vere ankaŭ ne, min posedaĵo de Hispanio. Tio estas la terpeco, kie mi hazarde naskiĝis kaj gajnis mian salajron kaj nun emeritiĝas. Se mia patro sukcesintus elmigri en Francion kiam la Intercivitana Milito finiĝis, je 1939^a, eble mi estus franco, ne hispano, kaj mia rilato al Francio estus sama kiel nune estas ĝi al Hispanio. Sed ĉian ajn opinion vi havu pri mi, legu pri mia rezonado pri tio, kion mi ĵus diris:

Kio estas demokratio? Certe ne nur tio, ke homoj voĉdonas kiam registaro vokos ilin, laŭ kondiĉoj deciditaj de registaro kaj neniam interagnoskitaj de la popolo. Male, la voĉdonadoj, kiujn la registaro de la Diktaturo

de Franko organizis, ankaŭ estus demokratiaj. Sed ili ne estis, ĉar popolo ne estis aŭskultata antaŭ ol fari leĝojn, sed ĝi estis tutelata de la registaro, same kiel ĝi estas tutelata de partioj politikaj nuntage. Por ke ekzistu demokratio, devas ekzisti du aferoj: **reprezenteco** kaj **divido de povoj**.

Estas evidente, ke en Hispanio deputitoj ne estas elekteblaj, se ili ne estas en la listo prezentata de politika partio. Ĉu ni, la popolo decidus pri tio? Ne, la politikaj partioj decidus. Sed por eniri la liston, oni devas esti lojala kaj fidela al ideologio de la koncerna partio, kaj ankaŭ al ties gvidanto. Laŭ la artikolo 6^a de la Konstitucio de 1978, partioj politikaj estas *Fundamentaj iloj por politika partopreno*, kio signifas, ke se oni ne aliĝas al partio, nenion oni povas fari en hispana politiko. Sekve, deputitoj ne zorgas pri la intereso de ni, la popolo, sed de ili, siaj partianoj, aŭ sia partio. Pro tio ne ekzistas demokratio en Hispanio. Dum ekzistis la Diktatoreco de Fransisko Franko, ankaŭ estis parlamento, kies anoj estis elektitaj de la diktatoro mem aŭ siaj partianoj. La popolo povis voĉdoni, kaj fakte faris ĝin, por elekti la trian parton de tiu parlamento. Sed la kiam deputito voĉdonis kontraŭe al Diktatoro, preĝisto kies nomon mi nun ne memoras, li estis eksoficigata subite. Nun deputitoj ne estas eksoficigataj

subite, se ili ne obeas la ordonoj de la gvidantoj de siaj partioj, sed ili estas insultataj kiel *transfuĝintoj* kaj oni petas de ili, ke ili *redonu sian postenon* en parlamento al sia partio. Tio estas cinikaĵo, ĉar la postenoj ne apartenas al partio, sed al homo, kiuj havas ĝin, sendepende al tio, ke ili estis prezentitaj de partio politika. Do, voĉdoni favore al popolo anstataŭ al partio, estas perfidi ĝin, sed perfidi la popolon estas bonorde, laŭ niaj politikistoj. Ĉu tio ne estas korupto? Sed la afero estas eĉ kontraŭleĝa pro tio, ke la artikolo 67^a-2 diras, ke la anoj de Parlamento ne estas ligitaj de imperativa mandato, kaj sekve influi en ties decidoj estas kontraŭleĝe. Sed tio ne gravas al registaro aŭ deputitoj mem. Jen la kerno de koruptado en Hispanio: prifajfado al leĝoj de tiuj, kiuj faras ilin. Sed tio okazas nur pro tio, ke deputitoj vere reprezentas partiojn, ne la popolo, al kiu mankas rimedo eksoficigi deputitoj kiam ili ne plenumas sian taskon.

Pri **divido de povoj** la afero fontas el Konstitucio mem, kiu per tio jam iĝis nedemokratia de sia naskiĝo mem: la artikolo 99^a-3 diras, ke la Kongreso de Deputitoj proponas la Prezidenton de la Registaro, kiun la Reĝo de Hispanio oficigos nur se li havas la konfidon de la de la

Kongreso de Deputitoj, nia Parlamento. Tio signifas, ke la povo ekzekutiva dependas el leĝfaranta povo, kaj sekve tute ne estas demokratio en Hispanio. Demokratiigi Hispanion postulas krei novan konstitucion, sed ne nome de diktatoraj deputitoj kaj ĝistiamaj sekretaj partioj, sed de la popolo mem. Pro tio oni devas voĉdoni deputitojn al Konstituiganta Parlamento, kies sola tasko estas krei novan demokratian Konstitucion.

Dume, oni havas nenion pri-festumi en Hispanio.

La faraono

Ĉapitro 46^a

Post duono da horo aperis la densaj amasoj de la egipta armeo, kaj baldaŭ la princa taĉmento atingis la tendaron. De ĉiuj flankoj eksonis alarmaj trumpetoj, la soldatoj kaptis la armilojn kaj sin starigis en la vicoj. La oficiroj falis al la piedoj de l' princo kaj same kiel hieraŭ post la venko, levis lin sur la ŝultrojn kaj komencis porti lin al ĉiuj taĉmentoj. La muroj de l' intermonto tremis de la krioj: "Vivu eterne, venkinto!... La dioj gardas vin!..."

Ĉirkaŭita de torĉoj, proksimiĝis la sankta Mentezufis. La kronprinco vidante lin, sin elŝiris el la manoj de la oficiroj kaj kuris renkonte al la pastro.

— Ĉu vi scias, sankta patro — ekkriis Ramzes — ni kaptis la libian ĉefon Teĥennan!...

La princo sentis la plenan justecon de la riproĉo, sed ĝuste tial la kolero ekregis lin. Li kunpremis la pugnojn, liaj okuloj ekbrilis.

Ĉirkaŭita de torĉoj, proksimiĝis la sankta Mentezufis. La kronprinco vidante lin, sin elŝiris el la manoj de la oficiroj kaj kuris renkonte al la pastro.

—Ĉu vi scias, sankta patro —ekskriis Ramzes —ni kaptis la libian ĉefon Teĥennan!...

—Mizera akiro —respondis severe la pastro —por kiu la militestro ne devis forlasi la armeon; precipe tiam, kiam ĉiun momente povis veni nova malamiko...

La princo sentis la plenan justecon de la riproĉo, sed ĝuste tial la kolero ekregis lin. Li kunpremis la pugnojn, liaj okuloj ekbrilis.

—En la nomo de via patrino, sinjoro, silentu!... —murmuretis Pentuer, staranta post li.

La kronprincon tiel mirigis la neatendataj

vortoj de lia konsilanto, ke tuj li trankviliĝis kaj komprenis, ke plej bone estos konfesi sian kulpon.

—Via ekscelenco diras la veron —respondis li. —La armeo la estron kaj la estro la armeon neniam devas forlasi. Mi pensis tamen, ke vi, sankta viro, anstataŭos min kiel reprezentanto de la ministro de la milito...

La trankvila respondo de la princo kvietigis Mentezufison, kaj la pastro ne rememorigis al la princo la manovrojn de la pasinta jaro, dum kiuj la vic-reĝo same forlasis la armeon kaj suferis poste malfavoron de la faraono.

Subite kun granda bruo proksimiĝis al ili Patroklo. La greka ĉefo ree estis ebria kaj de malproksime kriis al la princo:

—Rigardu, kronprinco: kion faris la sankta Mentezufis. Vi proklamis pardonon al ĉiuj libiaj soldatoj, kiuj forlasos la invadulojn kaj revenos en la armeon de lia sankteco... Ili aliĝis al mia taĉmento, kaj dank' al tio mi rompis la maldekstran flankon de la malamiko... Kaj la nobla Mentezufis ordonis ĉiujn mortigi... Pereis preskaŭ mil kaptitoj, ĉiuj niaj ekssoldatoj, al kiuj oni promesis la pardonon.

La sango leviĝis al la kapo de la princo, sed la staranta post li Pentuer murmuretis:

—Silentu, pro la dioj silentu!...

Sed Patroklo ne havis konsilanton, li do daŭrigis:

—De tiu momento mi perdis por ĉiam la konfidon de la fremdaj kaj de la niaj... Fine ankaŭ nia armeo perdos la disciplinon, kiam ĝi komprenos, ke en ĝian fronton englitis perfiduloj...

—Mizera dungito —respondis malvarme Mentezufis —vi kuraĝas tiel paroli pri la armeo kaj pri la konfidatoj de lia sankteco?... De kiam ekzistas la mondo oni aŭdis neniam tian blasfemon!... Mi timas, ke la dioj venĝos la insulton, kiun oni ĵetis sur ilin...

Patroklo maldelikate ekridis.

—Dum mi dormas inter la Grekoj, mi ne timas la venĝon de la noktaj dioj... Kaj kiam mi maldormas, la tagaj nenion faros al mi...

—Iru dormi, iru!... inter viajn Grekojn, drinkulo —diris Mentezufis —por ke pro via kulpo ne falu tondro sur niajn kapojn...

—Sur vian razitan kapon, monmanĝanto, ĝi ne falos, ĉar ĝi pensos, ke tio estas io alia!... —respondis la senkonscia Greko. Sed vidante, ke la princo ne subtenas lin, li reiris en la tendaron.

—Ĉu efektive... —demandis Ramzes la pastron —ĉu efektive vi ordonis, sankta

viro, mortigi la kaptitojn, spite mia promeso, ke ili ricevos la pardonon?...

—Via ekscelenco ne estis en la tendaro —respondis Mentezufis —do la respondeco pri tiu ĉi ago ne falas sur vin. Mi devas obei niajn militajn leĝojn, kiuj ordonas ekstermi la perfidajn soldatojn. La militistoj, kiuj antaŭe servis lian sanktecon kaj poste kuniĝis kun la malamikoj, devas esti tuj mortigataj —jen la leĝo.

—Kaj se mi estus ĉi tie?...

—Kiel la ĉefa militestro kaj filo de l' faraono, vi povas interrompi la plenumon de kelkaj leĝoj, kiujn mi devas obei —respondis Mentezufis.

—Ĉu vi ne povis atendi ĝis mia reveno?

—La leĝo ordonas mortigi senprokraste, mi do plenumis ĝiajn postulojn.

La princo estis tiel konfuzita, ke li interrompis la interparoladon kaj iris en sian tendon. Tie, falinte sur seĝon, li diris al Tutmozis:

—Jam hodiaŭ mi estas sklavo de l' pastroj!... Ili mortigas la kaptitojn, ili minacas miajn oficirojn, ili eĉ ne respektas miajn promesojn. Vi nenion diris al Mentezufis, kiam li ordonis mortigi la malfeliĉulojn?

—Li citis la militan leĝon kaj novajn ordonojn de Herhor...

—Mi ja ne ĉesis esti ĉefo, kvankam mi forveturis por duono da tago.

—Vi klare transdonis la komandon en la manojn de Patroklo kaj en miajn —respondis Tutmozis —kaj kiam venis la sankta Mentezufis ni devis cedi, ĉar li havas pli altan rangon...

La princo ekpensis, ke la kapto de Tehenna estis pagita per tro grandaj malfeliĉoj. Samtempe li klare komprenis, kiel grava estas la regulo, kiu ne permesas al la militestro forlasi la armeon. Li devis

konfesi, ke li ne estis prava; sed tio tiom pli incitis lian fieron kaj plenigis lin per malamo al la pastroj.

"Jen —pensis li —mi estas sklavo, eĉ antaŭ kiam mi fariĝis faraono (vivu eterne mia sankta patro!). Jam hodiaŭ mi devas komenci liberigi min kaj antaŭ ĉio silenti... Pentuer estas prava: silenti, ĉiam silenti, kaj siajn kolerojn, kiel multekostajn juvelojn, meti en la trezorejon de la memoro. Kaj kiam kolektiĝos... Ho profetoj, vi tiam pagos al mi!..."

—Via ekscelenco ne demandas pri la rezultato de la batalo? —diris Tutmozis.

—Ha, jes!... Kia do?...

—Pli ol du mil kaptitoj, pli ol tri mil mortigitoj, kaj apenaŭ kelkcento forkuris.

—Kiel granda do estis la libia armeo?

—demandis la mirigita princo.

—Ses ĝis sep mil homoj.

—Ne eble... En tia bataleto pereis preskaŭ la tuta armeo?...

—Tamen tio estas vera; tio estis terura batalo —respondis Tutmozis. —Vi ĉirkaŭis ilin de ĉiuj flankoj, la reston faris la soldatoj, kaj la nobla Mentezufis... Pri tia malvenko de malamikoj de Egipto ne parolas la monumentoj eĉ de la plej gloraj faraonoj...

—Iru jam dormi, Tutmozis, vi estas laca —interrompis la princo, sentante, ke la fiero leviĝas al lia kapo.

"Mi, do mi gajnis tian venkon?... Ne eble!..." —pensis li.

Li ĵetis sin sur la felojn, sed malgraŭ la morta laciĝo ne povis ekdormi.

Apenaŭ dek kvar horoj pasis de la momento, kiam li donis la signalon komenci la batalon... Apenaŭ dek kvar horoj?... Ne eble!...

Li, li gajnis tian batalon?... Li ja eĉ ne vidis

la batalon, li vidis nur flavan, densan nebulon, el kiu rivere fluis nehomaj kriegoj. Ankaŭ nun li vidas tiun nebulon, aŭdas la tumulton, sentas la varmegon, tamen estas nun neniu batalo...

Poste li ekvidis la senliman dezerton, tra kiu kun dolora peno li iris antaŭen sur la sablo. Li kaj liaj homoj havis la plej bonajn ĉevalojn de la tuta armeo, kaj tamen ili rampis kiel testudoj... Kaj kia bruliganta varmego... La homoj ne povas vivi en ĝi!...

Kaj jen leviĝas la tifono, kovras la tutan mondon, bruligas, sufokas... De la figuro de Pentuer saltas amase palaj fajreroj... Super iliaj kapoj eksplodas tondroj, fenomeno, kian li vidis ankoraŭ neniam... Poste la kvietita nokto en la dezerto... La kuranta grifo, la malluma silueto de l' sfinkso sur la kalka monto...

"Mi tiom vidis, tiom travivis —pensis Ramzes —mi ĉeestis ĉe la konstruado de niaj temploj, eĉ ĉe la naskiĝo de l' granda sfinkso, kiu ne havas plu aĝon, kaj... ĉio ĉi pasis en la daŭro de dek kvar horoj?..."

Lasta penso fulme trakuris la animon de la princo: "Homo, kiu tiom travivis, ne povas vivi longe..."

Malvarmo trakuris lin de la piedoj ĝis la kapo, kaj li ekdormis.

En la sekvinta tago li leviĝis kelke da horoj post la leviĝo de la suno. Li sentis pikadon en la okuloj, doloron en ĉiuj ostoj, li iom tuis, sed liaj pensoj estis klaraj kaj la koro -- plena de kuraĝo.

En la pordo de la tendo staris Tutmozis.

—Kio?... —demandis la princo.

—La spionoj alportas strangajn novaĵojn de la libia limo —respondis la favorato. —Al nia intermonto proksimiĝas granda hom-amaso; tio ne estas soldatoj, sed senarmilaj, virinoj kaj infanoj, kaj en ilia fronto Musavasa kaj la plej eminentaj

Libianoj.

—Kion tio signifas?

—Kredeble ili volas peti pacon.

—Post unu batalo? —miris la princo.

—Sed post kia batalo!... Krom tio la timo pligrandigas niajn armeojn antaŭ iliaj okuloj... Ili sentas sin malfortaj kaj timas la invadon kaj morton...

—Ni vidos, ĉu tio ne estas milita ruzo!...

—respondis la princo post pripenso. —Kaj kiel fartas la niaj?

—Bone; ili sate manĝis, trinkis kaj ripozis, ĉiuj estas gajaj. Sed...

—Kio?...

—Patroklo mortis nokte —murmuretis Tutmozis.

—Kiel?... —ekkriis Ramzes, salte leviĝante de la seĝo.

—Unuj diras, ke de ebriiĝo... aliaj, ke tio estas puno de la dioj... Li havis bluan vizaĝon kaj buŝon, plenan de ŝaŭmo...

—Kiel tiu sklavo en Atribis, ĉu vi memoras lin?... Lia nomo estis Bakura, li enkuris en la festenan salonon kun plendoj kontraŭ la nomarĥo... Kompreneble, en la sama nokto li mortis de ebriiĝo!... Kio?...

Tutmozis mallevis la kapon.

—Ni devas esti tre singardaj, mia sinjoro...

—murmuretis li.

—Ni provos —respondis trankvile la princo. —Mi eĉ ne miros pro la morto de Patroklo... Ĉu estas io stranga, ke mortis drinkulo, kiu ofendadis la diojn, eĉ... la pastrojn...

Sed Tutmozis sentis minacon en la mokaj vortoj.

La princo tre amis la fidelan, kiel hundo, Patroklon. Li povis forgesi maljustaĵojn, faritajn al li mem, sed lian morton li pardonos neniam.

Antaŭ la tagmezo, en la princa tendaron venis el Egipto freŝa regimento, teba, kaj krom tio kelkmilo da homoj kaj kelkcento da azenoj alportis grandan provizon da nutraĵo kaj tendojn. Samtempe de Libio ree alkuris spionoj, kun sciigo, ke la senarmila bando, proksimiĝanta al la intermonto, senĉese kreskas.

Laŭ la ordono de la kronprinco, multenombraj taĉmentoj de rajdistoj esploris la ĉirkaŭaĵon en ĉiuj direktoj: ĉu ie ne kaŝas sin malamika armeo? Eĉ la pastroj, kunpreninte malgrandan kapelon de Amon, suriris la supron de la plej proksima altaĵo kaj diservis tie. Reveninte en la tendaron, ili certigis la princon, ke, vere, proksimiĝas kelkmila bando de senarmilaj Libianoj, sed armeo estas nenie, en almenaŭ trimejla radio.

La princo komencis ridi la raporton.

—Mi havas bonajn okulojn, sed en tia interspaco mi ne povus ekvidi armeon.

La pastroj, post interkonsiliĝo, sciigis al la princo, ke, se li promesos ne paroli kun profanoj pri tio, kion li vidos, li konvinkiĝos, ke oni povas vidi tre malproksimen.

Ramzes ĵuris. La pastroj starigis sur altaĵo la altaron de Amon kaj komencis preĝi. Kaj kiam la princo, lavinte sin, demetis la sandalojn kaj oferis al la dio oran ĉenon kaj incenson, ili enkondukis lin en malvastan keston, tute malluman, kaj diris al li, ke li rigardu la muron.

Post momento komenciĝis piaj kantoj, dum kiuj sur la interna muro de la kesto aperis luma rondo. Baldaŭ la hela koloro malklariĝis: la princo ekvidis sablan ebenaĵon, sur ĝi ŝtonegojn, kaj apud ili postenojn de la Azianoj!...

La pastroj komencis kanti pli laŭte kaj la bildo aliĝis. Estis videbla alia loko en la dezerto, kaj sur ĝi homoj, ne pli grandaj ol formikoj. Iliaj movoj, vestoj, eĉ vizaĝoj

estis tiel klare videblaj, ke la princo povus ilin priskribi!...

La mirego de l' kronprinco estis senlima. Li frotis la okulojn, tuŝis la moviĝantan bildon... Subite li turnis la kapon, la bildo malaperis kaj restis nur mallumo.

Kiam Ramzes eliris el la kapelo, supera pastro demandis lin:

—Nun, erpatre, ĉu vi kredas la potencon de la egiptaj dioj?

—Vere —respondis la princo —vi estas tiel grandaj saĝuloj, ke la tuta mondo devus respektigi vin kaj fari al vi oferojn. Se vi same scias vidi la estontecon, nenio povas kontraŭstari al vi.

Post tiuj ĉi vortoj de la princo, unu el la pastroj eniris en la kapelon, komencis preĝi kaj baldaŭ eksonis de tie voĉo, parolanta:

—Ramzes!... pesitaj estas la sortoj de la ŝtato, kaj antaŭ kiam venos la dua plena luno, vi estos ĝia estro...

—Dioj!... —ekkriis la terurita princo —ĉu mia patro estas tiel malsana?...

Li falis vizaĝe sur la sablon, kaj unu el la asistantaj pastroj demandis lin, ĉu li ne volas ankoraŭ ion ekscii.

—Diru, patro Amon —respondis li —ĉu realiĝos miaj planoj?

Post momento la voĉo el la kapelo diris:

—Se vi ne komencos militon kontraŭ la oriento, se vi faros oferojn al la dioj kaj respektos iliajn servistojn, atendas vin longa vivo kaj regado plena de gloro...

Post la mirakloj, kiuj okazis en hela tago, sub libera ĉielo, la princo ekscitita revenis en sian tendon.

"Nenio povas kontraŭstari al la pastroj!..." —pensis li kun timo.

En la tendo li trovis Pentueron.

—Diru al mi, mia konsilanto —demandis li —ĉu vi, pastroj, povas legi en la homaj koroj kaj malkovri iliajn sekretajn intencojn?

Pentuer skuis la kapon.

—Pli facile oni povas vidi, kio estas en la interno de ŝtonego, ol sondi la homan koron. Ĝi estas fermita eĉ por la dioj, kaj nur la morto malkovras ĝiajn pensojn.

La princo profunde ekspiris, sed li ne povis liberiĝi de la maltrankvilo. Kiam vespere oni devis kunvoki militan konsilan kunvenon, li invitis ankaŭ Mentezufison kaj Pentueron.

Neniu diris eĉ unu vorton pri la subite mortinta Patroklo; eble tial, ke estis pli urĝaj aferoj. Venis libiaj senditoj, petegante en la nomo de Musavasa kompaton por lia filo Teĥenna kaj proponante al Egipto eternajn pacon kaj obeon.

—Malbonaj homoj —diris unu el la senditoj —trompis nian popolon, certigante, ke Egipto estas malforta, kaj ĝia faraono —ombro de monarĥo. Sed hieraŭ ni konvinkiĝis, kiel forta estas via brako, kaj ni decidis, ke pli prudente estos pagi al vi tributojn, ol konduki soldatojn al certa morto kaj nian landon al certa pereco.

Kiam la kunveno estis aŭskultinta ĉi tiun paroladon, oni ordonis al la Libianoj eliri el la tendo, kaj la princo Ramzes rekte demandis Mentezufison pri lia opinio, kio eĉ mirigis la generalojn.

—Ankoraŭ hieraŭ —respondis la profeto —mi konsilus forĵeti la peton de Musavasa, transporti la militon en Libion kaj detruigi la neston de la rabistoj. Sed hodiaŭ mi ricevis tiel gravajn novaĵojn el Memfiso, ke mi voĉdonos por pardono al la venkitoj.

—Ĉu mia sankta patro estas malsana?... —demandis la princo.

—Li estas malsana. Sed antaŭ kiam ni ne

finos kun Libianoj, via ekscelenco ne devas pensi pri tio...

Kaj kiam la kronprinco malĝoje mallevis la kapon, Mentezufis aldonis:

—Mi devas plenumi ankoraŭ unu devon... Hieraŭ, nobla princo, mi kuraĝis riproĉi vin, ke pro tiel mizera akiro, kiel Teĥenna, la militestro ne devas forlasi la armeon. Hodiaŭ mi vidas, ke mi estis malprava: se vi ne kaptus Teĥennan, ni ne havus tiel rapide pacon kun Musavasa... Via saĝo, ĉefestro, montriĝis supera, ol la militaj leĝoj...

La pento de Mentezufis mirigis la princon.

"Kial li tiel parolas? —pensis li. —Kredeble ne sole Amon scias ke mia sankta patro estas malsana!..."

Kaj en la animo de la kronprinco revekigis la antaŭaj sentoj: malestimo al la pastroj kaj malkonfido al iliaj mirakloj.

"Do ne la dioj profetis al mi, ke mi baldaŭ estos faraono, sed venis sciigo el Memfiso, kaj la pastroj trompis min en la kapelo. Se ili mensogis en ĉi tiu okazo, kiu certigos min, ke la vidaĵoj de la dezerto, montritaj al mi en la kesto, ankaŭ ne estis trompo?..."

Ĉar la princo senĉese silentis, de malĝojo, oni pensis, pro la malsano de la patro, kaj la generaloj ne kuraĝis ion diri post la kategoriaj vortoj de Mentezufis, oni fermis la kunsidon. Unuvoĉe oni decidis postuli de Libianoj kiel eble plej grandan tributon, sendi al ili egiptan garnizonon kaj ĉesigi la militon.

Nun jam ĉiuj atendis, ke la faraono baldaŭ mortos. Kaj Egipto, por fari al sia monarĥo konvenan enterigon, bezonis profundan trankvilon.

Forlasinte la kunvenon, la princo demandis Mentezufison:

—La brava Patroklo estingiĝis en la lasta

nokto; ĉu vi intencas, sanktaj patroj, honori liajn restaĵojn?

—Li estis barbaro kaj granda pekulo —respondis la pastro. —Sed li faris tiel grandajn servojn al Egipto, ke oni devas certigi al li eternan vivon ekster la tombo. Se do via ekscelenco permesos, ankoraŭ hodiaŭ ni sendos la korpon de la brava viro Memfison, por fari el ĝi mumon kaj transporti ĝin en ĝian eternan loĝejon, inter la reĝajn tombojn en Teboj.

La princo volonte konsentis, sed liaj suspektoj pligrandiĝis.

"Hieraŭ —pensis li —Mentezufis admonis min, kiel maldiligentan lernanton, kaj tio estis vera favoro de l' dioj, ke li ne batis min per bastono. Hodiaŭ li parolas al mi, kiel obeema filo al sia patro kaj preskaŭ falas sur la ventron. Ĉu tio ne estas signo, ke al mia tendo proksimiĝas la povo kaj kun ĝi la horo de la reguligo de l' kontoj?..."

Tiel meditante, la princo ŝvelis de la fiero kaj lian koron plenigis pli kaj pli forta kolero kontraŭ la pastroj, kolero silenta, kiel skorpiono, kiu kaŝinte sin en la sablo, vundas nesingardan piedon per sia venena pikilo.



ALEKSANDER GŁOWACKI (BOLESŁAW PRUS)

Kajeroj el la Suda



Bulteno de Hispana Asocio
de Laboristoj Esperantistaj



<http://www.gazetoteko.com/hale/kels97.pdf>

Socio

Kio okazas en Hispanio?

De kelkaj monatoj okazas pluaj skandaloj politikaj en Hispanio. Unue temis pri Kaso Gürtel', kies procedo daŭras jam dek jarojn, kaj poste S-oj Granados kaj González, du el la plej gravaj politikistoj en la Madrida Komunumo, jam estis enkarcerigitaj pro kontraŭleĝa financado de sia partio, PP, kaj ankaŭ pro preno da mono okaze de la Kanalo Isabel' 2^a, kiu provizas Madridon per akvo trinkebla.

Ĉu aliaj partioj faras malsame? Vere mi ne scias... Mi iam, kiel ĉiu hispano soifanta pri demokratio kaj libereco, sentis profundan respekton al politikistoj, tiuj homoj, kiuj deziris la bonon komunan kaj al tiu celo ili oferis siajn personajn komforton kaj laboron. Sed de kelkaj jaroj mi vidas, ke tiuj, kiuj devis esti ekzemplodonaj homoj estas avidaj pri mono kaj kondutas kvaŭzaŭ friponaj rabistoj. Ne ĉiuj, kompreneble, sed sufiĉe multaj, por ke mi, kiel komuna civitano, dubu pri la honesteco denaska de politikistoj hispanaj.

Ne, mi ne supozas, ke ili estas krimuloj, ne ĉiuj, sed mi ne estas devigita kredi, ke ili estas honestaj. Ĉar mi ne vidas, ke ili faru provizojn politikajn aŭ leĝajn eviti tion. Ĉi tiu estas la lando, kie politikistoj ne demisias, krom Esperanza Aguirre, kiu demisias je la momento, kiam mi verkas ĉi tiun artikolon, pro tio, ke ŝi estis trompita pro troa kredemo al siaj helpantoj, kiuj nun estas en karcerio.

Aliflanke, estas aliaj procedoj, kiel tiu de la ERE en Andaluzio: tio temas pri mono, kiun socialismaj politikistoj ne uzis por la intencitaj celoj, helpi la sendungitojn kaj organizi kursojn por rekapabligi laboristojn, sed ili enpoŝigis ĝin, kaj financis aliajn aferojn. Mi ne komprenas, ke estas tiom da bruo amaskomunika pri la unuaj politikistoj, sed tiom malmulte pri tiuj duaj. Ĉu eble pro tio, ke dekstro ĉiam estas suspektinda, kaj maldekstro tute ne eĉ se juĝisto diras aliel?